

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 1/2002
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Februaro 2002

Look inside for:

President's message	2
Learning E on the Internet	3
El la CO	4
New from the Book Service	4
NASKE News	5
ELNA Convention	5
K. Zamenhof Fund	5
Recenzoj <i>Pri nia lingvo</i>	8
Diversaj <i>plus</i>	11
MUZIKA CENTRO	6-7

Nova jaro kun novaj deĵorantoj ĉe UEA

Al ĉiuj usonaj geesperantistoj mi kun plezuro donas ĉi tiun koncizan raporton pri lastatempaj gravaj okazaĵoj en la internacia Esperanto-movado.

Okazis gravaj ŝanĝoj inter la dungitoj de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.

La Ĝenerala Sekretario Osmo Buller demisiis frue en 2002, kaj la Estraro post detala serĉado kaj konsiderado nomis 61-jaran William Trevor Steele de Aŭstralio nova Ĝenerala Sekretario. Li ekoficis je la 1-a januaro kaj servos provizore dum unu jaro.

Ankaŭ la Direktoro de la Centra Oficejo Pasquale Zapelli demisiis por sekvi karieron aliloke; provizore la Estraro ne nomas anstataŭanton, portempe kombinante la du oficojn en la oficon de Ĝenerala Sekretario.

Simo Milojević, multjara deĵoranto en la C.O., emeritiĝis je la fino de 2002 sed restos kelkajn monatojn por helpi la nove elektitan respondeculon de la Libroservo de UEA, Ionel Oneț. Por akcepti tiun poston Ionel demisios kiel vic-direktoro (ekde februaro 1989!) de la Centra Oficejo de ELNA en februaro 2002.

La redaktoro de *Esperanto*, István Ertl, demisiis je la komenco de la jaro kaj nova redaktoro, Stano Marček, slovako 48-jaraĝa, estis elektita de la Estraro. Stano redaktos la ĉefan organon de UEA ekde la januara numero de 2002.

La Estraro de UEA dum sia januara kunsido traktis inter aliaj aferoj ankaŭ la reorganizado de la komputila sistemo de UEA kaj eventualan malfermon de komunikad-centro de EEU en Bruselo.

Malgraŭ la eksterordinare multaj ŝanĝoj dum 2001-02, la Estraro de UEA rapide ŝtopis la breĉojn kaj daŭre strebas reharmonigi la funkciadon de via Asocio.

2002 estas elektojaro por ĉiuj delegitoj de UEA. Mi jam dissendis al ĉiuj usonaj delegitoj folion per kiu ili povas ĝisdatigi la informojn en la *Jarlibro* kaj cetere indiki, per tuja resendo de la folio, sian pretecon daŭre servi kiel delegito. Mi reelektos ĉiujn delegitojn kiuj respondas al la peto. Mi mem verŝajne estos reelektita Ĉefdelegito fare de la Estraro de UEA.

Fine, mi volas tutkore danki al miaj kolegoj en la usona delegita reto, pro ilia preteco servi Esperanton dum la pasintaj jaroj. Iuj delegitoj ne ricevas multajn servopetojn el ekstere, sed ili ĉiuj pretas loke propagandi por Esperanto kaj instigi membrecon en la internacia organizo. Se vi estas individua membro de UEA kaj volas fariĝi delegito, bonvolu kontakti min.

Estas plezuro por mi esti la gvidanto de nia elstare bona delegita reto.

William R. HARMON
Ĉefdelegito de UEA en Usono

While English is fast becoming a prereq for landing a good job in Europe, only 41% of the people on the Continent speak it – and only 29% speak it well enough to carry on a conversation, according to a European Commission report. The result is an English gap, one that divides Europe's haves from its have-nots. (*The Great English Divide* in *BusinessWeek online*, Aug 13, 2001)

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468
✉ elna@esperanto-usa.org
www.esperanto-usa.org

President/Prezidanto: David T Wolff
Vice President/Vicprezidanto: Grant Goodall

Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: William B Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj: Thomas Alexander, Jennifer Bondelid, Peggy Dolter, D Gary Grady, Angela Harlow, Ralph Lewin, Elizabeth Raible, Orlando E Raola, Derek Roff

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: Joel Brozovsky
Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de la Centra Oficejo: Ionel Oneț

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 38, No. 1
ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Ionel Oneț
☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468
✉ ionel@esperanto-usa.org

Materials for **esperanto USA** should be sent to/Materialojn por **esperanto USA** oni sendu al:

esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
or by e-mail/aŭ e-poŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its bulletin/La opinioj esprim-itaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permes-ate reaperigi materialojn el ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la re-publikigita materialo al ELNA.

Sez the Prez!

Saluton ĉiuj,

News from the Central Office: after thirteen-odd years as our Vice-Director of the Central Office and almost five years as Editor of *Esperanto USA*, Ionel Oneț is leaving for better opportunities with UEA. Ionel has worked long hours as a "sklavo de la Movado" (slave of the Movement) and has been one of the cornerstones of ELNA. It has been a pleasure working with him and we will miss him; our loss is offset only by the knowledge that UEA will now have Ionel's talents.

We have hired an experienced person as temporary Vice-Director and Editor, Don Harlow, so you should not experience any difficulties with the CO. However, the Board wants an open job search for both of these positions. Note that they are separate positions: although Ionel held both, and Don will be doing both for now, we are ready to have different people in the positions. See below for

more details.

And once again this newsletter contains a list of the "Five Most Wanted" volunteers for ELNA (p. 11). Again, we can provide help and advice, but the good ship ELNA goes nowhere without people manning the sails (or oars). The CO can do only so much by itself; if you want Esperanto to grow, you must water it with your sweat. Consider these words of wisdom from the Internet: "You can't make footprints in the sands of time if you're sitting on your butt. And who wants to leave butt prints in the sands of time?"

Congratulations to Jacob Schwartz! A year ago he started monthly lunch meetings in the Boston area, and has been organizing Winterterm courses at MIT. The lunches have continued for an entire year. Between those, the courses, and some other local activities, the Boston group is reaching the point where we are considering restarting official monthly meetings.

David WOLFF, President
dwofff@world.std.com or
dwofff@theworld.com
978/264-0286 (8-10pm Eastern time
weekdays, noon-5pm weekends)

HELP WANTED BY ELNA

Due to Ionel Oneț's leaving ELNA to work for UEA, there are two payed positions at ELNA opening up. Ionel held both of them, and temporarily both of them will be filled by Don Harlow, but there is no reason that they need to be held by the same person. Starting the beginning of February 2002, Don will serve in these positions provisionally until permanent employees are hired.

1. Vice Director of the Central Office of ELNA

Full time position. The Vice Director works together with the Director to ensure the smooth functioning of the office and administering of ELNA's services. Proficiency in both English and Esperanto are necessary, and Spanish would be a plus. This work may include, but is not limited to the following tasks:

- Administer ELNA's memberships, keep the databases up to date, and fulfill member services.
- Administer the book and subscription services, and maintain relationships with the publishers as needed.
- Disseminate information about Esperanto and ELNA to members and the general public.

- Maintain bookkeeping with accurate data entry into the computer.
- Prepare financial and budget reports as needed for the treasurer and Board.
- Prepare mailings for bulk rate mailing, according to the strict requirements of the US Postal Service.
- Pay bills on time.
- Contribute articles for the bulletin.
- Assist at ELNA's annual conference and maintain the book service at the conference.

2. Editor of ELNA's bulletin *Esperanto USA*

Currently published bimonthly (6 issues per year). Part time, can be done at home. Compensation is \$400 per issue.


Anyone interested in either of these positions can contact Joel at ELNA's office. Applicants should send a résumé and a letter describing experience with Esperanto and related affairs, the reasons for wishing to take on the position, and ideas about what advantages the applicant can bring to the position. Send applications to Joel Brozovsky, ELNA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, or by e-mail to joel@esperanto-usa.org.

Learning Esperanto on the Information Highway

Learning Esperanto has existed in two ways since its inception, on one's own, or with an instructor. Learning from an instructor, in a classroom or in a home, will always be the best way to learn Esperanto. The kind of personal attention given to a student by a proficient speaker cannot be replaced. However, the Internet is a viable alternative to traditional mail courses.

Online correspondence courses have revolutionized the learning process for Esperanto. No longer do students have to wait weeks for their lesson to be returned, the Internet brings instant communication one click away. While online courses will never replace personal teaching, they are wonderful, particularly if the prospective student does not have access to a nearby tutor or teacher. Based on my own experiences in learning Esperanto, I will attempt to outline some important tips for using a few online Esperanto courses.

I began my Esperanto voyage in the fall of 2001 under the guidance of Dr. Houpe, a long time Esperanto teacher, at the North Carolina School of Science and Mathematics. My mission, as a student and evaluator, was to research several Esperanto courses over the Internet.



The first course that I looked at was the Free Esperanto Course, located at <http://pacujo.nu/esperanto/course/>. Overall, the course received a grade of 7 on a scale from 1 to 10. The number of lessons in the course is immaterial, what is key is how much time one spends on the course. I found that spending an initial thirty minutes looking over the information, another fifteen answering the questions, and about an hour reviewing and

studying the lesson works well. I learned that it is hard to stay focused on a language that has no immediate value. A genuine interest in the language, however, will forestall any problems.

The challenge of the questions in each lesson is ideal. The twenty questions asked start easy, and become quite difficult by the end. All lesson questions require the student to use knowledge gained from all previous lessons. The feedback was wonderful. It may take a while to establish an E-mail link with a tutor. However, the tutor will work hard to accommodate any student's needs. Arguably, this is the best course out there. The course is to the point and no-nonsense. The tutors reflect that attitude. So, if you want to learn the basics the good old-fashioned way, take this course.

The next course I looked at was the Esperanto Viva, at the site <http://www.wtios.cs.utwente.nl/esperanto/hypercourse/index.html>. Right away, something jumped out at me when I saw this course. It attracted me because it seemed more dynamic than the Online Esperanto Course, probably because it was designed as an online course, not as a mail correspondence course. The overall grade is an 8, better than the Online course. The strengths of this course lay in the content in each lesson, which is focused on language and conversational skills primarily, with grammar secondary. Even better, the feedback is very informative and quick! My tutor responded within a few hours or a day at most after I submitted a lesson over the Internet. It could have had more lessons. The feedback and challenge of the course is impressive.

The last course I studied in depth was entitled Esperanto Hypercourse at the site: <http://www.mintex.demon.co.uk/espviva/index.htm>. I think that this course is best utilized as a resource center for the basic grammar rules of Esperanto. It was set up as a Hypercourse, first and foremost, with the student using the mouse to move along

from lesson to lesson, with a single click. This is not, however, a course for in-depth or detailed study.

I would recommend that a student use this course as a check for his or her knowledge of grammar. The interface of this course is conducive for quick access to any part of any lesson. If a student has a question about grammar, instead of searching page after page of a lesson, he or she can go to the Hypercourse and easily answer a grammar question. Check back to this course down the road and see if more lessons have been added.

Esperanto is fun because it is about interaction with people. Even learning it brings one into contact with a tutor, who will provide as much feedback and interaction as the student wants. Then, after learning Esperanto, there are so many programs, groups, and people around the world who know Esperanto that it becomes a new family for the student. Esperanto is as fun as one wants it to be, and with the number of people enthusiastically involved in it, I am discovering just how great Esperanto is.

Learning Esperanto is not easy. One must be self-motivated because it takes time to learn the vocabulary and grammar in order to gain a proficiency in the language. Like any other language, only continued use will lead to proficiency. As the saying goes, life is a journey, not a destination. One should see Esperanto as a language course lasting a lifetime. Overall, what I learned from Esperanto is positive, and will definitely affect me the rest of my life.

Those seeking to use the Internet as a quick way to learn Esperanto I applaud you. However, try your best to become involved with other speakers. Remember your reasons for learning Esperanto. It still takes time and energy to learn the language, and while the Internet certainly makes it more convenient to learn, it does not make it easier.

My report can be found at <http://iluvatar.ncssm.edu/~mellingc/>. Here, one can find the courses analyzed in more detail, with links to vocabulary, grammar, and course resources.

Christopher MELLING (Durham, NC)

Inversa metamorfozo en la ELNA-oficejo

La nova jaro 2002 alportas grandajn ŝanĝojn al la Centra Oficejo de ELNA. La plej konstanta kaj stabila eco de la oficejo (krom la poŝtkesta adreso) forvaporigis kaj malaperos. Temas pri la vic-direktoro de la oficejo Ionel Onet. Nu, li ne vere forvaporigis, nur malaperos de nia oficejo kaj de nia lando, kiel vi povas legi en lia adiaŭa saluto sur tiu ĉi paĝo. Tiel, ne la ekstero ŝanĝigis, kiel ĉe raŭpo, sed la interno ŝanĝigis: inversa metamorfozo.

La foriro de Ionel lasas grandan malplenon en tiu ĉi oficejo. Dum 13 jaroj estas li konstante ĉi tie kiu scias kion fari, kaj certigas ke ĝi estas farita ĝusttempe laŭ la limdatoj. Pluraj ELNA-membroj memoras, ke la eldonritmo de nia bulteno akiris fidindan regulecon nur post lia transpreno de ĝia redaktado. La libroservo kaj aliaj servoj de ELNA iĝis fideinde rapidaj ĉefe pro liaj klopodoj kaj konstanteco. Tiuj plibonigoj de la servoj de ELNA certe kontribuis multe al la kontento de ELNA-membroj kaj al la efikeco de la multnivela Esperanto-agado en Usono. Li certe troviĝis en mallonga listo de la plej valoraj movadanoj en Usono de la lasta jardeko. Dankon, Ionel, kaj feliĉon en via nova vivo en la "Malnova mondo". Mi antaŭvidas pluan fruktodonan kunlaboron kun vi per poŝtoj papera kaj reta.

Pro la foriro de Ionel, ni ekserĉas novajn vicdirektoron por la oficejo kaj redaktanton por tiu ĉi bulteno (vidu anoncon sur paĝo 2). Tiu serĉado tamen povas postuli plurajn monatojn, por taŭge diskonigi la informojn, intervjui kandidatojn, kaj el ili efekti dungoto(j)n. Ĉar tiom da tempo ni ne havas antaŭ la foriro de Ionel, ni jam dungis

provizoran anstataŭanton kiu feliĉe estis preta tuj eklabori. S-ro Donald Harlow komence de februaro eklaboris kiel agantaj vic-direktoro kaj redaktoro de *Esperanto USA*. Lia nomo certe estas konata inter la plimulto el niaj membroj, kiel iama prezidanto de ELNA, redaktoro de la bulteno, kaj pli frue kiel direktoro de la Centra Oficejo. Ankaŭ kiel Esperanto-aktivulo en la interreto. Mi tre ĝojas ke tiom kompetenta homo pretas plenumi la breĉon kaj kunlabori kun mi en la oficejo.

Ĉijare, same kiel lastjare, Sankta Nikolao favoris nian libroservon. Antaŭ unu jaro ni ricevis grandan stokon da libroj por nia libroservo de s-ino Doris Conner. Ĉijare, simila, kvankam malpli granda, donaco venis al ni de ELNA-membro s-ro Edwin de Kock. En ambaŭ kazoj, mi havis okazon viziti la koncernan hejmon por aranĝi la pakadon kaj fortransportadon de la libroj.

Edwin de Kock estas konata Esperanta poeto kiu mem eldonis plurajn librojn de sia poezio tra la jaroj kiam li ankoraŭ loĝis en Sudafriko. La restantan stokon de tiuj libroj, post plurfoja translokiĝo kaj veturado preskaŭ ĉirkaŭ la mondo, li malavare donacis al ELNA. Vi povos trovi ilin en la ĉi-suba listo. Nia libroservo estas la ĉefa distribuanto de tiuj libroj de s-ro de Kock, do al libroservoj ni vendos ilin kun triona rabato. Multan dankon al Edwin kaj al lia edzino Ria kiu tre afable helpis min aranĝi la librojn por forporto, kaj gastigis min kaj mian kunvojaĝanton Philippe Chavignon. Dankon ankaŭ al Philippe pro la afablaj veturigado kaj hel-

Joel BROZOVSKY

Tempus fugit...

... kaj ankaŭ Ionel

Tempo fuĝas, rimarkigis la latina poeto antaŭ pli ol 2000 jaroj. Nesentebles fuĝis ankaŭ la lastaj 13, kiujn mi pasigis laborante en la CO de ELNA. Finiĝas do 13-jara periodo, dum kiu mi portis diversajn ĉapelojn: vicdirektoro de la CO, arkivisto, redaktoro de *Esperanto USA*. Mi retrorigardas, kun fiereco kaj nostalgio, al tiu defia periodo, dum kiu mi dediĉis min, miajn energiojn kaj tempon al laboro, kiun nekonatumaj nemalofte subtakas. Mi fieras esti plenuminta tian laboron. Kaj mi nostalgias pensante pri la centoj kaj centoj da homoj, kun kiuj mi rilatis kiel deĵoranto en la CO de ELNA. Inter ili – tro multaj por menciigi – mi ŝatus menciigi miajn kolegojn, de kiuj mi multe lernis kaj kun kiuj mi pasigis tiom da agrablaj horoj: Mark C. Stephens, Mike Donohoo, Miko Sloper, Joel Brozovsky. Dankon, amikoj!

Venis por mi la tempo antaŭeniri kaj plenumi revon "de jardekoj", nome labori en la CO de UEA. Malkiel kelkaj antaŭaj dungitoj de ELNA, mi ne kabeas: mi antaŭeniras. Tio donos al mi pliajn defiojn kaj okazojn por montri mian amon al Esperanto. Kaj, kompreneble, pliajn okazojn lerni plu kaj konatiĝi kun eĉ pli da samlingvanoj. Sendube kelkajn inter la legantoj de ĉi linioj mi renkontos dum E-eventoj tra la mondo. La plezuro estos miaflanke, samkiel ĝi estis dum mia laboro ĉi tie kaj dum la dekoj de E-renkontiĝoj, kiujn mi partoprenis en Usono.

Mi havas la fortan konvinkon ke la Estraro de ELNA kaj la Direktoro de la CO kune trovos taŭga(j)n anstataŭanto(j)n por mi kaj ke tiu(j) persono(j) kontribuos same dediĉe al la antaŭenigo de nia afero en Usono. Sukceson!

Dankon al ĉiuj pro la ebleco kiun vi donis al mi labori por vi. Ionel

NEW FROM THE BOOK SERVICE

JAPANESKOJ, Edwin DE KOCK. Short original poems in forms similar to Japanese poetry—haiku, tanka or double tanka. With preface by Nakamura Tazuo and 20 pages of notes by the author. 1982. 114p. 190x110. Brochure. South Africa.

AP001 \$3.00

KVIN ELEMENTOJ, Edwin DE KOCK. Original poem, written in 1957-58, in 5 parts: water, air, earth, fire and time. One of the masterworks of original Esperanto poetry, accord-

ing to William Auld. 1970. 55p. 160x100. Paper. South Africa.

KVI002 \$2.10

PLUKONSTRUE, Edwin DE KOCK. Original poetry to "further build" the poet's art and collective works, according to his preface. 1975. 40p. 200x140. Brochure. South Africa.

PLU001 \$1.80

POEMARO KAJ PROZEROJ, Edwin DE KOCK. Original poetry and some short prose,

with prefaces both front and back: one from the author, the other from Vilmos Benczik. 1970. 106p. 160x100. Paper. South Africa.

POE001 \$3.00

SALUTON AL LA SUNO, Edwin DE KOCK. Original poetry from South Africa. With glossary, notes, and a list of the poetry of de Kock, with reference to the book in which the poem was published. 1983. 90p. 200x120. Brochure. South Africa.

SAL002 \$3.00

NASK 2002

ONLY THE SCENARY IS CHANGING

The 33rd North American Summer Workshop of Esperanto (NASK) will be held not in San Francisco but at The School for International Training (SIT) in Brattleboro, Vermont. SIT is the home of the famous "Experiment in International Living" and its graduate-level programs help students develop cross-cultural competence and global leadership capabilities. It is a world leader in language education and intercultural training (see <http://www.sit.edu/>).

The three-week course will begin on Monday, July 8, and finish on Friday, July 26. The classes will be taught by three eminent instructors from different parts of the world: Ilona Koutny (Hungary/Poland), Alexander Melnikov (Russia) and Roberto Resende (Brazil).

While being immersed in learning Esperanto, students will also benefit from the presence of the many students who come to SIT from all over the world each summer to complete their studies of English. This will only add to the international ambiance and increase the possibilities for true intercultural encounters. As usual, plans are being made for out of class activities during the evening and on weekends.

Brattleboro, with 12,000 inhabitants, is situated in an historically rich area known as the "Hub of New England" because of its easy access from Interstate 91 and its closeness to Massachusetts and Connecticut in the south, New Hampshire in the east, and the recreational areas of the Green Mountains in the west. It is easily reached by Amtrak, bus and shuttle service, plane, or car from Boston, Concord, Montreal, New York, and Hartford. The beautiful SIT campus – a former estate – is situated on a hill just outside the city.

Housing costs are \$640 in a shared room and course costs are \$900. Scholarships are again available.

For more information contact: Ellen EDDY, 11736 Scott Creek Dr SW, Olympia WA 98512 or eddyellen@aol.com or www.esperanto.org/nask/

KLARA ZAMENHOF NEW MEMBER STIPEND

The Klara Zamenhof Stipend is aimed at new, eager Esperantists of all ages. Most new Esperantists begin with personal study, and it may take several years before they join a local club or ELNA. We hope to introduce them to the national and international movements more quickly, thereby shortening their learning curve and increasing their enthusiasm and level of Esperanto activity. The Klara Zamenhof Stipend will pay the first year's ELNA membership for promising new Esperantists.

The New Member Stipends, funded by donations from ELNA Board members and other Esperantists, will help at three levels. The recipient will gain more rapid entry into the world of Es-

peranto, and appreciate receiving our newsletter, *Esperanto USA*, and the other benefits of ELNA membership. ELNA will gain new members, some of whom will continue and develop into lasting supporters of Esperanto. Finally, local clubs will have more members integrated with the national organization, who can contribute at the local level some of the energy and ideas that they pick up from ELNA.

We ask your help in publicizing this program and suggesting it to new Esperantists in your area. Contact the ELNA Central Office for the simple application form.

Tax deductible donations to the Klara Zamenhof Fund are welcome.


Derek ROFF (Albuquerque NM)

LA 50-A KONGRESO DE ELNA

—kelkaj informoj—

Multaj el la kongresaj programeroj estas jam elektitaj. Inter ili estas prezentado fare de Ron Glossop, titolita "La simileco inter la argumentoj por Esperanto kaj por Demokrata Mondfederacio". Profesoro Glossop longtempe aktivas en la pacmovado kaj la mondfederacia movado. Fakte, lia libro *World Federation? a Critical Analysis of World Government* eldonita en 1993 estas lastatempe tradukita en Esperanton, sub la titolo *Monda Federacio? ampleksa analizo de Federacia Mondregistaro* kaj estas aĉetebla de la libroservo de ELNA. La libro ja estas leginda. Ĉu vi konsentas kun la profesoro rilate al liaj ideoj? Nu, legu lian libron, ĉeestu lian prezentadon kaj postulu ke li pravigu sin! Tiu programero promesas esti tre interesa kaj informplena.

Alia interesa temo estas tiu pritraktota de Fred Meyer, esperantisto kies fako estas fiziko. Li estas lertulo pri silicio, la elemento sur kiu estas bazita nia moderna teknika mondo, pro tio ke ĝi estas la subtavolo de la moderna integrigita cirkvito. D-ro Meyer priskribos kiel oni faras uzeblajn siliciajn tranĉaĵojn. La sukceso kritikeme dependas de la pureco de la siliciaĵo. Lia prezentado "Siliciaj tranĉaĵoj: fundamento de modernaj elektronikaj integrigitaj cirkvitoj" bone montras ke Esperanto valoras kiel taŭga lingvo ankaŭ por scienco kaj teknologio. Do, venu aŭskulti ĉi tiun prelegon, kaj iomete informiĝi pri ĉi tiu mirinda teknika procezo.



GRAVE!

Nepre telefonvoku al la Hawthorn Suites Hotel (800-767-1777) kiel eble plej baldaŭ por rezervi vian ĉambron por la ELNA-Kongreso en Sakramento, junio 21-24. Estas multaj aliaj hoteloj en la ĉirkaŭaĵo, sed neniu pli konvena. Vi povas nuligi la mendon ĝis du tagoj antaŭ via proponita alvendato. Do, eĉ se vi nun ne estas tute certa ĉu vi povas ĉeesti la kongreson, nepre rezervu vian ĉambron hodiaŭ.

Henry STUDER (Davis CA)

Iom da bono de Bruna ŝtono, Mikaelo BRONŝTEJN. KD. Tihvin: 2000. Kodo: IOM001. Prezo: \$15.80

Aŭskultante tiun ĉi kantokolekton de Mikaelo Bronŝtejn, konata figuro en sovetia/rusia E-movado, nun ankaŭ internacie konata E-kanzonisto, mi denove revivis emociojn, kiujn mi havis aŭdante Mikaelon kanti en amika rondo de samideanoj en la (nun jam legendaj) E-tendaroj en Sovetio. Mi supozas, ke tiuj ĉi kantoj povas permesi al alilandanoj kompreni (aŭ, pli ĝuste, eksenti) la etoson, intenson kaj ardon de E-vivo, kiu estis rimarkinde libera, sendependa, memorganizita kaj vigla en lando kun socia reĝimo, kiu – milde dirate – ne aprobis tion.

Proksimume samtempe kun reviviĝo de la tiea E-movado, en Sovetio meze de la 1950aj jaroj, aperis tiel nomataj “bardoj” – poetoj, kiuj plenumis siajn poemojn-kantojn, ofte recitative, kun gitara akompano. Iom post iom tio transformiĝis en sufiĉe amasan movadon, eŭfemisme konatan kiel arto de “amatora kanto”. Ĝi nomiĝis “amatora” (kontraste al “profesia”, plejparte sterila kaj bombasta oficiala arto, malavare kultivata kaj subvenciata de la registaro) formale pravigebla ankaŭ per tio, ke en la kantoj de bardoj la tekstoj ofte estis pli gravaj ol la teknikaj aspektoj de kantado kaj instrumenta akompano. Spite al la komploto de silento flanke de oficialaj, ŝtataj (aliaj ne ekzistis!) televido, radio kaj gazetaro, “bardoj” estis ekstreme popularaj, kaj magnetofonaj registraĵoj de iliaj koncertoj estis ĉie aŭdeblaj. Ĉiuj konis la nomojn kaj kantojn de Bulat Okuĝava, Vladimir Visockij, Jurij Vizbor kaj



multaj aliaj bardoj. Multaj el la kantoj ezope (t.e. alegorie kaj alude, alimaniere ne eblis), sed kuraĝe preparolis aferojn nepenseblajn por publikigo aŭ eĉ mencio en severe cenzuritaj oficialaj amaskomunikiloj.

Mikaelo Bronŝtejn estis tia bardo en la sovetia provinco de Esperantujo. Kleraj, lingve matura-

turnaj, saturitaj per historiaj, literaturaj kaj E-movadaj aludoj, ironiaj kaj sarkasmaj, sed samtempe plenaj de kortuŝa sincereco, ĉiu el liaj kantoj-baladoj estas miniatura novelo aŭ fablo, kiu per nemultaj strekoj kreas portreton aŭ priskribas situacion, preskaŭ ĉiam plurtavole. Multaj el la kantoj enhavas tre bildecajn observojn de karakteraj detaloj de sovetia/rusia socia kaj ĉiutaga vivo. Multaj kantoj rekte

rilatas al Esperantujo kaj esperantistoj.

La aŭtoro kantas kaj gitaras nature kaj senpretende, kun varma homeco, fojfoje eĉ kun inter-versaj klarigaj komentoj por tiuj, kiuj povus ne rekonii nomon aŭ aludon (en la kanto *La verda ĝardeno*). Kantado kaj gitara akompano de la aŭtoro estas integra parto de la ĝenro kaj neniel ĝenas la komprenon de la tekstoj. Ankaŭ la prononcado de Mikaelo estas tute klara.

Jen kelkaj faktaj klarigoj pri aferoj nememevidantaj el la kantoj:

» SEJM, menciita plurfoje en la kantoj, estas Sovetia Esperantista Junulara Movado, tre aktiva E-organizaĵo, kiu memlikvidiĝis ĉ. 1979 por ne inciti la “instancojn” kaj por faciligi la fondon de ofici-

ale permesita Asocio

de Sovetiaj Esperantistoj. Kio

sekvis el tia oficialiĝo estas satire

priskribita en la kantoj *Novaj kondiĉoj* kaj

Verda ĝardeno.

» “Urbo de fianĉinoj” en la kanto

Amitaj, amataj, amotaj estas Ivanovo, kiu havis tian reputacion pro multaj teksaj fabrikoj, en kiuj tradicie laboris plejparte virinoj. Ĝi estis ankaŭ urbo kun tre forta E-movado, kie okazis multaj E-tendaroj kaj konferencoj.

» Vorkuta estas norda karbominista urbo, kie Mikaelo longe laboris.


Mi rekomendas tiun ĉi diskon al ĉiuj. Vi sendube ĝuos la kantojn kaj eble ankaŭ ĉerpos inspiron en la etoso kiun rivelas la kantoj de Mikaelo: esperantisteco, kiu ne estas nur hobia, sed neforigebla parto de la vivo kaj mondopercepto.

Alexander SHLAFER (San Mateo CA)

Kia viv', Kore. KD. Donneville: Vinilkosmo, 2000. Kodo: KLA001. Prezo: \$16.90

Fojfoje, muzikamanto esperantista devas akcepti tion, ke por ĝui muzikon en sia lingvo, oni devas preteratenti iujn mankojn. Preteratentindaj estas eraroj pri lingvo, mankoj je muzika kapablo, produkto-kvalito de la registraĵo ktp. Per *Kia viv'* Kore atentigas, ke ankaŭ en Esperantujo troviĝas unuarangaj talentoj.

Sur tiu ĉi disko estas kantoj kun muziko facile aŭskultebla, sed tekstoj iom maltrankviligaj. Temas pri kantoj pri la defioj de la vivo: HIV, la (mal)ĝojo de la amo, la junula emo preteratenti la konsekvencojn de riskaj



aventuroj. Tamen, la vivo ne ĉiam iras glate, kaj la kantoj de Kore frapas la orelon per rakontoj, kiuj kongruas kun la sperto de la hodiaŭa junularo.


La kantoj estas ĉiuj bonaj, sed la muzika stilo varias inter dolĉa kaj pli malmola. Multajn pliajn vortojn pri la disko mi povus diri, sed la plej forta rekomendo estas tio, ke mi aŭskultis ĝin preskaŭ senĉese dum pluraj tagoj post kiam mi ricevis ĝin. Ĝi estas bona rokmuziko!

Menciindas ankaŭ la arto de Bruno Lassale, kies bildoj bele kaptas la econ de ĉiu kanto. *Kia viv'* estas vera indaĵo de Esperanta rokmuziko. Ne maltrafu ĝin!

Charli GALVIN (San Francisco CA)

Ni tostu la verdan fortunon..., Georgo HANDZLIK. KD. Bielsko-Biała: Kleks, 1999. Kodo: NIT001. Prezo: \$19.30

Antaŭ kvarono de jarcento, malpli kostaj tehnikaj rimedoj por registri kaj obligi kasedojn ekpermesis la aperon de multe pli variaj kaj multnombraj kanto-kolektoj en Esperanto. Multaj el tiuj kasedoj traktis ĉefe aŭ tute movadajn, E-kulturajn kaj lingvajn temojn. "Ravaj, ĉarmaj" diris la recenzantoj,



"sed ĉu nia kulturo ne kapablas produkti muzikon pri la universalaj homaj temoj, same kiel aperas en ĉiuj aliaj lingvoj?" La merkato kontentigis tiun peton. Des pli dum la KD-periodo, kantoj mondecaj laŭ temo kaj stilo abundas, kaj primovadaj diskoj malofitas.

Se vi estas inter tiuj, kiuj foje sopiras pri novaj kant-diskoj pri ni, pri nia unika kulturo, *Ni tostu la verdan fortunon...* interresos vin. Georgo Handzlik, kiu kromnomas sin "Bardo sen barbo", prezentas dek naŭ kantojn pri la movado, la Esperantista vivo kaj la perspektivo de ties membroj. Li verkis la tekstojn de dek sep el la kantoj, kaj la muzikon de la plejparto. Li kantas per plaĉa voĉo, kun gitaro kaj foje klavaro, laŭ simpla, kabareda stilo, kiu certe memorigos multajn pri la neformalaj kantvesperoj en kluboj kaj kongresoj. Simile, la temoj portos vin al tiaj memoroj. Spriteco kaj milda pikado de nia komunumo abundas. *Kabeĝos iam mi listigas plurajn malfeliĉigajn aspek-*

tojn de nia afero. La kantanto promesas, post ĉiu elreviĝo, ke li kabeos. Sed tamen, ne nun. *Dek klubanoj* rakontas pri la sinsekva malapero de ĉiuj klubanoj, ĝis fine ne estas konkurenco por la prezidanta posteno.

Ankaŭ seriozaj, kaj eĉ kortuŝaj, kantoj aperas. *La knaboj de nigra-blanka foto* meditas pri la posta skua viv-historio de la esperantistoj en malnova foto. *Justaj bomboj* ironie traktas la militistan "solvon" al mondaj problemoj. *Tropostulo* sopiras al pli bona mondo, *Ukrainio* deziras ke amo venku la landlimojn kaj registarojn.

La dek naŭ kantoj sumas pli ol kvindek minutojn, taŭga longeco por KD, kaj la dublo de pluraj aliaj KDoj, kiujn la Esperanta kantistaro proponas. Mia sola bedaŭro estas ke la disko ne kunhavas la

vortojn en presita formo. Se plaĉas al vi la kabareda stilo kaj movadaj temoj, tiu ĉi disko estos bona aldono al via kolekto.


Derek ROFF
(Albuquerque NM)

The Music of Davis Gaines. Woburn: MMC Recordings, 2001. \$14.95

The American composer David Gaines has created a serious and important composition for symphony orchestra and mezzo-soprano using texts in the International Language.

Gaines chose the beginning of Zamenhof's opening speech to the 6th UK, which took place in Washington DC in 1910, to start off the Esperanto Symphony. Although this gesture intends to laud the creator of the International Language, it takes a strange turn and becomes focused on the United States. Gaines quotes fragments of the *Star-Spangled Banner* as Zamenhof's text refers to "Lando de libereco, lando de estonteco... la plej potenca reprezentanto de la nova mondo". The overall mood of the first movement is solemn and pensive with an appropriate level of dignity. Gaines then shifts the mood to a quick and urgent hymn to lovers of freedom, using a poem from Marjorie Boulton's collection *Eroj*. A mysterious and heavenly text of Bulgarian poet Penka Pa-

pa-z o v a gives Gaines a vehicle to show his postmodern sense of instrumentation as otherworldly sounds blend with slow romantic strings to highlight the elegant and subtle melodies. The final movement sets a poem which Gaines himself wrote in a nicely compact style. It summarizes the ideas of the earlier movements and reflects on the nature of freedom, before allowing the symphony to disappear into the aether at the very end.



Mezzo-soprano Kimball Wheeler's overall pronunciation of the texts is good and clear, despite several little occurrences of uncertain vowels. And there are a few problems with the translations provided in the liner notes. For example "Ili flustras en la animo" is rendered as "They flutter in the atmosphere." But these imperfections matter little in the face of this grand and ambitious composition. Gaines has given the Esperanto community another monument which shows the manifestation of the potential which we always assert (although we have had all too little to point to). Previously Lou Harrison's noble work *La Koro Sutro* and Nanne Kalma's *Eŭropo-Trilogio* [on *Tohuvabohuo*] have been the only recorded compositions of large proportion which utilize Esperanto texts. Now Gaines has contributed another major work which can hold its own against any other modern symphony.

Although there are apparent influences of Ives, Górecki and Hindemith, Gaines has unmistakably found his own voice with a distinct personality and a spirit rooted in the branch of the Western classical tradition which values music as an aesthetic experience: this music is pleasant and aims to caress rather than attack the ear.

Miko SLOPER (Berkeley CA)

En la komenco estas la vorto, Geraldo MATTOS, Chapecó: Fonto, 2000. 166p. Kodo: ENL001; Prezo: \$7.50

Tiu ĉi kompakta, enhave densa verko traktas plurajn tiklajn kaj defiajn fenomenojn de Esperanta gramatiko. Kiel Geraldo Mattos klarigas jam en la antaŭparolo ("Prezento"), la verko estas rezulto de esploroj, faritaj de li kune kun Eurico Back. En tiu esplorado, laŭ la aŭtoro, Esperanto ludis gravan rolon kiel modelo por solvi portugallingvan problemon. La rezultoj de la origina esploroj estis publikigitaj en 1972 sub la titolo *Gramática Construtural do Língua Portuguesa*, kiun Mattos ial tradukas kiel *Konstruktura Gramatiko de la Portugala Lingvo* (supozeble temas pri *strukturisma gramatiko*, t.e. gramatika priskribo, uzanta metodologion de la Strukturisma Skolo). Tamen la publikigo de la (kronologie antaŭa) apliko de la metodo, kiun uzas la aŭtoro, al Esperanto efektiviĝis nur en la recenzata verko. Tia intriga origino, kaj la fakto, ke Prof. Mattos estas prezidanto de la Akademio de Esperanto, sendube pliiĝos intereson de la leganto.

Esence la libro estas eseo, kiu skizas gramatikan doktrinon alternativan al la tradicia gramatika priskribo en *Plena Analiza Gramatiko* (PAG) kaj samskolaj verkoj. Tamen la libro de Geraldo Mattos apartenas al alia ĝenro ol PAG. Ĝia senpera celo ne estas kompleta kaj detala priskribo de Esperanta gramatiko, sed enkonduko al la metodologio, kiu, laŭ la aŭtoro, permesas tian priskribon pli adekvate. Tia polemika rilato al PAG kaj la "tradicia" gramatiko (mi kun ioma hezito uzas tiun epiteton, ĉar ankaŭ klasika strukturismo kaj eĉ pli novaj lingvistikaj teorioj iĝis jam tradiciaj), malgraŭ konataj mankoj kaj valida kritiko de PAG, tamen ne misgvidu la leganton, ĉar la aŭtoro libere, sen redifino aŭ pliprecizigo, uzas multajn tradiciajn konceptojn kaj terminojn kaj implice akceptas, ekzemple, la teorion de bazaj vortkategorioj de Esperantaj radikoj kaj la sortimenton de la tradiciaj parolelementoj, ktp. Tial kelkloke estas malfacile kompreni, kion precize signifas iuj terminoj. Ekzemple, mi ne komprenas, ĉu la enlistigo de "ili" kiel "esence nelibera pronoma morfemo" inter

"hom", "bel" kaj "am" estas eraro (ja la aŭtoro mencias, ke "ili devige prenas unu solan duan morfemon"), aŭ la (ne difinita) signifo de iu el la terminoj iel pravigas tiun fakton.

Kelkajn teorie neriproĉeblajn, sed nekutimajn vidpunktojn Mattos lasas nesufiĉe motivitaj kaj tial ili aspektas arbitraj. Tiel, la (laŭ mi, historie hazarda fakto), ke verbaj formoj "-u" kaj "-us" havas la saman vokalon, estas interpretita kiel ekzisto de eventuala modo, markata per morfemo "-u-", kaj ke "-s" estas markilo de asertaj verboformoj, kontraste al volitivo. Rezulte, por priskribi 5 finitivajn verboformojn (-as, -is, -os, -us, -u), estas aldonitaj 3 "akcidentaj pozicioj" (A-6, A-7, A-8): la unua, nepra, kun tri valoroj (-a, -o, -i-), la dua kun du (-u- aŭ nenio), la tria - same kun du (-s aŭ nenio). En tiu 3-dimensia spaco kun teorie eblaj $3 \times 2 \times 2 = 12$ valoroj estas uzitaj nur 5 per nemotivebla regulo, kiu esence diras "Uzu nur tiujn ĉi kvin!", kaj almenaŭ kondicionalo havas iom arbitran interpreton: -(i)-(o)-u-s. Krome, tio kreas homonimajn morfemojn. Ne estas klare, ĉu la motivo de tiu ĉi prefero estas avantaĝoj de matematika modelado (kiaj?), aŭ psiholingvistikaj konsideroj (kiuj?).

Mattos enkondukas ankaŭ sufiĉe multajn novajn terminojn. Plejparte ili estas interne koheraj kaj formas bone pripensitan, eĉ elegantan, sistemon, kvankam multaj legantoj trovos konfuza la uzadon de termino "propozicio" por tio, kion oni tradicie nomas "frazo", kaj de termino "sentenco" en la (tradicia) senco de "propozicio".

Plejparte la libro traktas Esperantan vortfaradon, tamen oni trovos multajn observojn ankaŭ pri sintakso. Unu el la plej esencaj principoj, kiujn sekvas la aŭtoro, estas la ideo, ke vortfarado kaj frazostukturo de Esperanto estas esence unuecaj kaj baziĝas sur la samaj strukturismaj principoj: "vorto estas simple unu el la lingvaj strukturoj, kaj la farado de vorto kun morfemoj estas absolute egala al la farado de lokucio kun vortoj, [...], sentenco kun lokucioj [...], propozicio kun sentencoj" (p.11). Kvankam tiu aserto estas polemike troigita (jam la el-lasita fina parto de la citita frazo rivelas, ke la epiteto "absoluta" estas hiperbolo, kiun

verŝajne Mattos-poeto sufloris al Mattos-lingvisto, kaj ke la sencon de "egala" oni interpretu iom elaste), tiu ĉi citaĵo resumas la gvidprincipon de la programo de la aŭtoro kaj ilustras kelkajn el gravaj terminoj, kiujn li uzas. "La tuta sciado pri la faro de vorto dependas de la procedo de subordigo, kiu havas nenian misteron por la superaj niveloj, sed estas ignorata de la scienca komunumo

por la vorto", resumas la aŭtoro. La ceteraj procedoj estas kohero kaj superordigo.

Eble indas klarigi, ke en tiu ĉi libro leganto ne trovos gramatikan priskribon formalan, pretan por uzado en lingvoprilabora komputado. Kompense, Mattos malavare disŝutas multajn valorajn kaj sagacajn observojn kaj ideojn pri la strukturo de Esperanto, pri komplikaj gramatikaj fenomenoj kaj ilia priskribo. Jen nur kelkaj ekzemploj de tiaj pensovecaj rimarkoj: analizo de diferenco inter la vorto

"belo" kaj "beleco" (p. 58); rimarko pri primitiviĝo de kutimaj kunmetaĵoj (p. 83); kritiko de teorio, laŭ kiu "martelado" kaj "brosado" interpreteblas kiel simpla nomo de ago/fakto. La libro rivelas grandan laboron faritan de Geraldo Mattos, lian atenton al detaloj kaj intelektan kuraĝon.

Preseraroj ĝenerale ne estas multaj, sed ial ili iomete plinombrigaĵas fine de la libro. Eble utilis averti usonanojn, kiuj vane serĉus la enhav-tabelon komence de la libro, ke ĝi ja ekzistas, sed ĉe la fino.

Resume, mi rekomendas tiun ĉi libron al ĉiuj, kiuj volas pli profunde kompreni la gramatikan meĥanisman de nia lingvo kaj trovi alternativan eksplikon de kelkaj lingvaj fenomenoj, kies interpreto en PAG estas kontestebla. Mi opinias la aperigon de tiu ĉi libro grava paŝo en la direkto al iam kompletigota science rigora gramatika priskribo de Esperanto.

Alexander SHLAFER (San Mateo CA)

When ordering from the ELNA Book Service, please remember that all orders have to be pre-paid. There is a shipping and handling charge and, only for Californian addresses, sales tax. For details, please see our current catalog or take a look at our on-line catalog: www.esperanto-usa.org.



Apartaj mondoj: verboj kaj participoj. Gerardo MATTOŠ. 88p. Dua eldono. Chapecó: Fonto, 1999. Kodo: APA001. Prezo: \$6.70

La plej kompleksa inter la parolpartoj – la verbo – ĉiam interesis la pensulojn pri la lingvaj problemoj, en la eŭroptipa kulturo, ekde la antikvaj grekaj filozofoj ĝis niaj tempoj. Demokrito, verŝajne la unua, distingis la t.n. **rhema**-n, tiun propozician parton rolantan kiel predikato, alprenitan de Aristotelo kaj de aliaj, ekzemple de Dionizo Traco (**Thrax**) – la fondinto de la morfologio en la 2a jc. a.K. – kaj de pli postaj gramatikistoj. La roma Varono (**Varro**), en la 1-a jc. a.K., donis tre interesan klasifikon de la parolpartoj en la latina, en kiu la verbo kaj la participo estis apartaj klasoj, kvankam la latina nomo de la laste menciita, **participium**, volis diri, ke tiu parolparto dividas siajn ecojn kun aliaj du, al kiuj ĝi do *partoprenas*, t.e. al la nomo (kiel adjektivo, laŭ pli posta subklasifiko) per la deklinaciebleco, kaj al la verbo per la eblo esprimi tempojn (preterito, prezenco kaj futuro), neegale distribuitajn inter la aktiva kaj pasiva voĉoj. Cetere, transsalte la tempo-daŭron inter la Antikvepoko kaj la 19a jc., Zamenhof mem tre probable inspiris sin el la mikrosistemo de la latinlingvaj participoj, konsideritaj origine kiel verbaj adjektivoj: du aktivaj, t.e. la prezenca, ekz. **cantans**, kun la genitivo **cantantis** “kantanta” (videble, la E-lingva morfema strukturo **kant-ant-** estas latindevena), kaj la futura, **cantaturus** “kantonta”; fine, unu pasiva, la preterita, ekz. **cantatum** “kantita”, **perditum** “perdita” (diferencaj ne laŭ la gramatika senco, sed laŭ la konjugacio, kio ne malhelpis tamen la ĉerpon de varisencaj E-lingvaj pasiv-participaj sufiksoj: **-at-**, por **kant-at-**, **perd-at-** k.s., kaj **-it-**, por **kant-it-**, **perd-it-** k.s.).

Sed la iniciatinto kompletigis kaj, por tiel diri, intence, konscie plisistemigis tiun modelon de mikrosistemo, egaligante la nombron de la participoj ene de la du voĉoj en E, nome proponante po tri participajn formojn kaj valorojn por ĉiu voĉo, cele al la pli nuanciga esprimpovo de la intertempaj diferencoj pere de analiza konjugacio, kompare al la sama esprimpovo per la t.n. simplaj (sintezaj) verbaj formoj. Tio ebligas la pason de nur tri simplaj verbaj formoj de la indikativo al la pli nuancaj naŭ **kunmetitaj aktivaj** kaj aliaj naŭ **kunmetitaj pasivaj** verboformoj, do, entute, al dekok analizaj verbaj formoj, ne havantaj kompletajn kaj perfektajn korespondaĵojn en iu ajn etnolingvo. Kaj tio iel okazigis en Esperantujo la “kverelon

pri la participoj”, la t.n. *-ita/-ata-problemon*. Sekve, la aŭtoro de la prezentata libro prave skribas: “La verba sistemo de E estas tiel originala, ke ĝi profunde diferencas de tiuj de ĉiuj etnolingvoj kun la malagrabra rezulto, ke ĝi estas senescepte malfacila por ĉiuj esperantistoj, kvankam en diversaj gradoj” (p.5).

Bedaŭrinde, mi ne konas la enhavon de la unua eldono (de kiu jaro?), por ebla komparo kun la nuna, sed, ĉar sur la interna kovrilpaĝo de ĉi-lastata mankas ajna ordinare aldona precizigo, mi supozas ĝin neŝanĝita, kaj – nek havinta la okazon legi recenzo(j)n de la antaŭa eldono – mi limigas min en la ĉi-subaj linioj iom resumi kaj kelkfoje komenti la ĉefajn partojn de la legitaĵo.

La libreto komenciĝas per ia kritiko de la 6a regulo en la *Fundamenta Gramatiko*, pro ties teoria nesufiĉo (nura morfologia pritrakto de la verboformoj, ambigueco de la pasivaj formoj, manko rilata la aktivajn kunmetitajn formojn), kvankam ĝi estas iel praktike kompletigata per la ekzercoj en la paragrafoj 22, 24 kaj 25. En alia ĉapitro pritraktanta semantike (laŭsignife) la verboformojn (p.10-29), la aŭtoro tre pacience kaj detale analizas kelkajn gravajn el ili, nome tiujn de indikativa futuro, de indikativa prezenco, de indikativa preterito, de kondicionalo kaj de imperativo. Ĉi tie, ankaŭ la *Plena Analiza Gramatiko* troviĝas kritikebla (p.28), laŭ la vidpunkto de la aŭtoro (kritiko reprenita kaj plivastigita aliloke, p.70 k.s.). Kaj la komento de la fundamenta regulo menciita estas ampleksigita en alia, aparta ĉapitro (p.30-38), kun abundo de klarigaj ekzemploj, tre pacience kaj detale ankaŭ ili konsiderataj, ne malofte apogataj sur la konsideroj vortumitaj de aliaj aŭtoroj, ĉu vortaristoj, ĉu gramatikistoj, zorge citataj.

En la centraj, plej gravaj ĉapitroj de la verketo: *La elekto de la participoj* (p.39-45), *Signifo de la participoj* (p.46-52) kaj *Insidoj de la pasivaj formoj* (p.53-75), la aŭtoro ekiras de la ideo, ke, kvankam en la kunmetitaj verboformoj la participoj enhavas tempvalorajn sufiksojn, ili estas tamen adjektive uzataj, kaj la adjektivoj ne esprimas la tempon (spite la koncedon pretere ekzemplatan per neparticipaj adjektivoj sur p.41-42), sed nur la verbo *esti*, trovita kiel dusenca, “faras” tion (p.42).

Mi liveras ĉi-tie du-tri ĉi-koncernajn edifajn citaĵojn el la verketo, provante tiel klarigi la pensmanieron de la aŭtoro per liaj propraj vortoj.

La unua tekstas jene: “[...] ĉia adjektivo

rilatas nur al la substantivo, se ni situas en lingva analizo, kaj ĉia priskribo rilatas nur al ia estaĵo, se ni situas en la eksterlingva realeco [...] ĉiaj adjektivoj priskribas, kaj sekve devas rilati al la tempo en kiu situas la estaĵo” (p.41). Tiun citaĵon kompletigas la sekvanta: “[...] participoj estas adjektivoj, kaj la kohereco de E implicas, ke ili havu la semantikan konduton de ĉiuj aliaj adjektivoj” (p.43), esprimanta personan normigan vidpunkton de la aŭtoro; sed li tute ne neglektas mencii la kontraŭan opinion, kiu distingas inter aga kaj stata participoj, nur la unua estiganta – laŭ tiu opinio – la pasivon (sampaĝe).

La tria citaĵo tekstas jene: “Se tiuj participoj povas esti parto jen de aga fakto (la pordo estas fermata: la pordo moviĝas), jen de stata fakto (la pordo estas fermata: la pordo restas senmova post la fermomoviĝo), tio ne dependas de ilia dusenceco, sed de la rekta dusenceco de la verbo *esti*, kiu meritas profundan esploron” (p.42). Laŭ gramatika vidpunkto, do – laŭ ebla, post la legaĵo, mia konkludo – oni distingu inter **esti 1** kiel helpa verbo, kvazaŭ gramatika prefikso, en la konjugacio (gramatika verba paradigmo), kun morfologia rolo, alidire: verbo helpanta esprimi temposignifon, kaj **esti 2** kiel kopulo en la vortumo de predikativa sintagmo (vortkombino egala al simpla propozicio), kun do sintaksa rolo, alidire: verbo rilatiganta predikativon al subjekto (kp. *PIV*). Aldone dirate, **esti 1** estas unikajo en E (kompare al la franca lingvo, en kiu **être 1** formas duopon kun **avoir**, aŭ al la itala, en kiu **essere 1** formas duopon kun **avere**; al la rumana, en kiu **a fi 1** formas triopon kun **a avea** kaj **a vrea**, aŭ al la germana, en kiu **sein 1** formas same triopon kun **haben** kaj **werden**; al la angla, en kiu **to be 1** faras pli ampleksan serion kun **to have**, **to do**, **shall** kaj **will**), dum **esti 2** partoprenas la saman serion kun aliaj verboj, kiaj **ŝajni**, **resti**, (far)**iĝi**. Eĉ plie, mi denove aldonas, oni devas distingi la uzon de **esti 1** (*helpa verbo*) kaj **esti 2** (*kopulo*), al kio la aŭtoro aludas, disde tiu de **esti 3** (memstara semantike kaj sintakse signifanta “ekzisti; troviĝi, situi”, ekz. *Brazilo estas en la Suda Ameriko*, kiu, sendube, ne interesas rekte la aferon pritraktatan de la aŭtoro, ĉar ĝi ne rilatas la participojn, almenaŭ la adjektive finiĝantajn.

Iom surpriza apektas la aserto: “[...] E ne konas absolutan kaj relativan tempojn, sed nur la tempon de la dialogo (lingva tempo) por finitivaj verboformoj kaj la tempon

(daŭrigo sur la sekva paĝo)

de la fakto por la participoj (lingva aspekto)” (p.44). Se mi bone komprenis tiun aserton, la aŭtoro limigas la lingvan (oni povus diri ankaŭ: gramatikan) tempon nur al la simplaj verbaj formoj (tiuj finiĝantaj per **-as**, **-is**, **-os**...), kaj la lingvan (gramatikan, verban) aspekton nur al la participoj (enhavantaj la sufiksojn **-ant-**, **-int-**, **-ont-**, **-at-**, **-it-**, **-ot-**) por probable pli emfaze subteni tiel la dusencecon de la verbo **esti**, trovante sian apogon en gramatika specifaĵo de la portugala lingvo (oni pensu ankaŭ pri la hispana), kiu(j) disponas du apartajn verbojn, respondajn al la du sencoj postulataj por **esti**, t.e. **ser** kaj **estar**. Sed oni rajtas demandi sin: ĉu oni povas tiel nete distingigi, tiel abisme apartigi la du verbajn kategoriojn – tempo kaj aspekto – eĉ se ne temas pri etnolingvo, sed nur pri planita lingvo? Mi dubas tion. Tro netan distingon inter verbo kaj participo la aŭtoro substrekas preskaŭ ĉie en la libro; sur p.49, kie – cetere, prave – estas distingitaj la instruoj kaj la reserĉo, li aldonas: “[...] participoj estas apartaj mondoj [disde la verboj – mia aldono, C.D.]”, kio ankaŭ donas la titolon de la libreto. Sed ĉu tute neniu gravecon havu la fakto, ke ĉiam la participoj havas nur verbajn radikojn, ĉu neniu gravecon havu la fakto, ke la participaj sufiksoj estas simetrie laŭforme parencaj al la tipe tempaj verbaj finaĵoj? Oni sendube distingu en E la participojn disde la propre-diritaj verboj, sed tia distingo kuŝas – laŭ mia modesta opinio – ne, ĉefe, en ia sentempeco de la participoj, sed en la diverĝo de la plenformaj participoj disde la propre-diritaj verboj, pere de la adjektivigo, substantivigo kaj adverbigado de la unuaj.

Nerekte, el la pli supre citita aserto de la aŭtoro povus rezulti konkludo vortumebla jene: en E – almenaŭ en kio koncernas la aktivajn participojn – ne ekzistas kunmetitaj (analizaj) verboformoj, sed nur simplaj, kaj nur la pasivo estas privilegiebla, kiel kunmetita verboformo, kvankam ankaŭ tiaj gramatikaj kunmetaĵoj povas esti ambiguaj.

Same nerekte, almenaŭ tion oni povas dedukti el la legaĵo, la aŭtoro kvazaŭ refutas la eblon de E ekivalenti, ekzemple, anglalingvajn dirmanierojn, kiaj **I sing** kaj **I am singing**, **I sang** kaj **I was singing**, pere de, respektive, **mi kantas** kaj **mi estas kantanta**, **mi kantis** kaj **mi estis kantanta**, aŭ franclingvajn, kiaj **je chanterai** kaj **j'aurai chanté**, **je vais chanter** kaj **j'allais chanter**, **je chantai**, **j'ai chanté** kaj **j'avais chanté**, pere de, esprim-laŭ-esprime responde, **mi**

kantos kaj **mi estos kantinta**, **mi estas kantonta** kaj **mi estis kantonta**, **mi kantis**, **mi estas kantinta** kaj **mi estis kantinta**, kiujn verŝajne la iniciatinto konsideris kiel struktur-modelojn por sia lingvo-projekto, unikigante (kompare la ĉi-tieajn franclingvajn ekzemplojn) nur la helpan verbon.

La normiga fortostreĉo estas sentebla ĉie laŭlonge de la legaĵo, kaj – kvankam la aŭtoro kelkfoje komparas E-lingvajn esprimojn al alilingvaj respondaj (ĉu germanaj, ĉu francaj aŭ portugalaj) – li strebas proponi normojn precipe el la interna vidpunkto, tiu de la gramatika sistemo de E, kvazaŭ ĝi estus aperinta kaj funkcia tute sendepende de la gramatikaj sistemoj de la t.n. naturaj lingvoj, kvazaŭ ĝi ne estus havinta historion (kvankam nelongan ĝis nun) kaj eksterajn originojn. Unuflanke, E estas iasence sendependa de ili, kaj tio donas parton de ĝia specifaĵo; la alia parto de ĝia specifaĵo devenas de la sintezo, kiun ĝi montras surbaze de eksteraj lingvaj faktoj, fontintaj/fontantaj el variaj naturaj lingve, precipe eŭropaj kaj, el inter ili, precipe okcidentaj. Aliflanke, kaj nome konsiderante aparte iun aŭ alian lingvan fakton, la sistemo de E respegulas iun aŭ alian aspekton de uzo de la denaskaj lingvoj de ĝiaj parolantoj. Tio pruvas la fakton, ke ĝi estas ne nur skemsimila, sed vivanta lingvo, kaj ĝi restos tia dum ĝi celas kaj celos transponti inter la plej variaj etnolingvoj kaj la kulturoj portataj de ili.

Aparte substrekindas, spite la multon de cititaj faktoj, da ekzemploj kaj skemoj, kiuj povus riski la tedon de nepaciencaj legantoj, ke la libro estas – kontraŭe – verkita en agrabla, ne malofte sprita stilo. Mi citu laŭ diversaj paĝoj, iom komentante:

“Cetere, jam delonge mi konstatis, ke E estas absolute senpartia lingvo: ĝi prezentas malfacilaĵojn por ĉiuj [...] kvankam ni trumpetas pri ĝia facileco, dum ĝia plej elstara kvalito estas la maksimume kompleta reguleco en la lingvo!” (p.18) – oni retenu el la citaĵo la absolutan senpartiecon de E, kaj ne la absolute, sed nur maksimume kompleta reguleco!

“Mi ripetu: la estantaj participoj ne indikas daŭron, sed nur la tempon de la fakto, kiu povas esti momenta, se ni pafas sagon, kaj jarcenta, se ni konstruas kolonjan katedralon...” (p.62) – tre trafa, inspirita esprimo de la ĉefa ideo, reganta la enhavon de la libreto.

“[...] la kreinto mem de E gvidis sin per la ebleco transformi la particon en relativan propozicion, sed lia lingva intuicio estis mul-

te pli bona ol liaj reguloj...” (p.67) – kio tamen iom kontraŭas la ĝeneralan sintenon de la aŭtoro, nome tre strikte reguligi la uzadon de la participoj, spite la intuicion de la E-parolantoj.

“Sekve de tio, Zamenhof plu diradis, spite de kritikoj: mi estas okupata. Mi tamen aldonu, ke tia elekto estas pure persona, kaj nia amata William Auld [...] preferas la alian dirmanieron: mi estas okupata. Cetere, de laboro por E!...” (p.75) – alivorte: **De gustibus et de coloribus non disputandum!**

Kaj la fino de la *Konkludo*, sprite petola: “Mi tamen esperas, ke la profito de ĉi mia verketo estu (estu, ne nur estos...) nek inta nek ita, sed anta kaj ata!” (p.79). Plaĉus al la recenzanto, se ĉi tiuj linioj venus renkonte al la espero de la verkinto kaj ankaŭ al tiu de la legontoj.

Preseraroj, foje kun gravaj sekvoj en tiaj verkoj, feliĉe tre raras kaj facile korekteblas dum la legado (kiel tiuj sur p.21, 27, 41, 48, 49), nur sur p.26, en la frazero “verboformoj de sendependaj aŭ dependaj propozicioj”, la unua adjektivo iom ĝenas la komprenon (temas, sendube, pri “sendependaj”, kiu, dum la kompostado, estus perdinta eron de la antaŭlasta silabo kaj sekve dirus tion alian anstataŭ la presitajon). Kaj sampaĝe iom ĝenas, laŭ la stila vidpunkto, la unua adjektivo, kunmetita kun la radikoj de la antaŭa substantivo, en la frazero “[...] indikas tempon samtempan aŭ postan koncerne la unuan...”, anstataŭ kiu konsilindus uzi “koincid(ant)an” por eviti la ripeton de la radikoj.

Estus nehoneste miaflanke pretendi, ke mi estus leginta ĉion (eĉ se mi flankenlasas privatatan konversacion kaj personan komunikon) en la citata bibliografio, okupanta du preskaŭ plenajn paĝojn; tamen mi ne trovas tie menciita la verkon laŭteme parenca de Daniel Moirand.

Aludante ĝentile siajn amindajn legantojn, la aŭtoro demandas sin, interparen-teze, humure kaj kvazaŭ dube: “ĉu mi havos ilin?” (p.62). Antaŭ ol fini, ne sciante ĉu mi estas privilegiata leginto, mi tamen sentas la agrablan devon precizigi, ke la libreto – se atente legata – estas tre interesa, instrua kaj instiga pliprofundigi la studon de la E-lingvaj sistemo kaj strukturoj.

Constantin DOMINTE (Bukareŝto RO)

Pro manko de spaco, ne ĉiuj novaj libroj listiĝis en la rubriko *New from the Book Service*. Ili tamen aperas en nia reta katalogo ĉe: www.esperanto-usa.org kaj listiĝos en la baldaŭ aperonta papera katalogo.

Menciinde

Gratulojn al Peter E. Browne (Edinburg TX), pri kiu *poesiafronteriza* <www.geocities.com/joseismaell1957/poesiafronteriza.html> skribas: "Lector poliglota ha leido a los clasicos en frances, aleman, portugues, gallego, y latin, y ha publicado su poesia en esperanto".

Adiaŭon al la ĵus forpasintaj: John Grund (Bay Shore NY), Benn E. Clouser (Wilmington DE) kaj Thomas O. Brace (Camarillo CA).

New list of local Esperanto groups!

We are updating ELNA's list of local Esperanto groups. If the information for your club or organization has changed or begun to exist since the last appearance of this list (you can check online at <http://www.esperanto-usa.org/local.html>) please send me the name, contact information, and location of the group. Even if it is informal or infrequently meets, let us know. I am waiting for your response!

Elizabeth RAIBLE, 212 Power St,
Providence RI 02906; ☎401/453-4234;
✉elizabethraible@hotmail.com

Bonvenon

al la jenaj novaj membroj de ELNA (aliĝintaj inter la 1-a de novembro kaj 31a de decembro 2001)

Katari Brown (Kenneth Square PA), Joseph Davies (Forest Park IL), Ade Kamson (East Point GA), Flora Sanchez (Silver Spring MD)

Leteru!

Ricardo Alves DE OLIVEIRA, José Alexandre de Farias 471, BR-58051-550 Bancários João Pessoa (Paraíba), Brazilo, komencanto, deziras korespondi kun eksterlandanoj por plibonigi sian Esperanton.

Sérgio Silva DE QUEIROZ, r 66 N° 120, Conj. Carlos Jereissate, BR-61900-000 Maracanaú (Ceará), Brazilo, 29-jara laboristo, volas korespondi por plibonigi sian Esperanton. Ŝatas aŭskulti muzikon kaj legi.

Ardell SHIREY, 1106 Rebecca Ln, Humble TX 77338, Usono, 74-jara inĝeniero volas korespondi por plibonigi sian Esperanton kaj por koni novajn kulturojn. Intresoj: poŝmarkoj, klasika muziko, kuracplantoj, ŝako.

Heshmat FARAJI, 4647 Willis Av #220, Sherman Oaks CA 91403, Usono, heshmt@aol.com, turkidevena vidvino ŝatus konatiĝi kun usonaj esperantistoj.

FIVE MOST WANTED

by the Esperanto League

These volunteer tasks are on the lam. The League needs your help in apprehending them!

Task: Resources Committee head. Do fundraising inside and outside of ELNA, find other resources.
Priority: 1. Time: 1-2 hours per week. Permanent (English).

Task: Talent Bank/Volunteers Committee. Match volunteers and projects through the Talent Bank.
Priority: 1. Time: 1-2 hours per week. Permanent (English).

Task: Publicity Committee: mass media. Produce and distribute press announcements.

Priority: 1. Time: 1-2 hours per week. Permanent. English.

Task: Constant Amusement Committee/Agent (KAKA). Make certain that the Movement is amusing and fun. May include running around naked. (This position can be anonymous.)
Priority: 2. Time: 1-2 hours per month. Permanent (Bilingual).

Task: Publishing Committee. Acquire, publish, and advertise books owned by ELNA.
Priority: 3. Time: 1-2 hours per month. Permanent (English).

You do not need to be an expert – but you do need enthusiasm! To help, contact David Wolff at:
✉dwolff@world.std.com, ☎978/264-0286, or 6 Durkee Rd, Acton MA 01720.

DONACOJ ALENA DUM LA PERIODO 1 nov – 31 dec 2001 DONATIONS TO ELNA DURING THE PERIOD Nov 1 – Dec 31, 2001

CHILDREN AROUND THE WORLD FUND: Danny Borowski: \$10.00; James Faughnan: \$10.00; Ronald Glossop: \$10.00; Jerry Johnson: \$10.00; Takaki Hashimoto: \$5.00; Maria Murphy: \$5.00.

GENERAL FUND: Ellen Eddy: \$500.00; Doris Vallon-Wheeler: \$300.00; Kazuma Mori: \$200.00; John Buchanan: \$100.00; David Halley: \$100.00; Stanley Neil Glass: \$100.00; Jacob Schwartz: \$100.00; Antonio Gomez: \$50.00; Annke Mattson: \$50.00; Lee Miller: \$50.00; Ralph Orsi: \$22.50; Dale Diefenbach: \$20.00; Bernice Garrett: \$19.76; Marian Davis: \$10.00; Stefan Slak: \$10.00; Takaki Hashimoto: \$5.00; Jared Brockway: \$3.57.

GIBSON FUND: Doris Vallon-Wheeler: \$280.00; John Wiseman: \$46.87; Jerry Johnson: \$10.00; Ardell Shirey: \$10.00; Takaki Hashimoto: \$5.00.

GLENNY FUND: Joseph Gamble: \$5.00; Takaki Hashimoto: \$5.00; Suzanne Moser: \$4.00; James Jenkins: \$2.00.

GOLDMAN FUND: Takaki Hashimoto: \$5.00.

HISTORY FUND: Henry Studer: \$100.00; Lee Miller: \$50.00; Doris Vallon-Wheeler: \$50.00; Stan Buchholz: \$25.00; Robert Bussard: \$20.00; Takaki Hashimoto: \$5.00.

KLARA ZAMENHOF FUND: Takaki Hashimoto: \$5.00.

LEWIS FUND: Maria Murphy: \$10.00; Takaki Hashimoto: \$5.00.

NASKE FUND: Lee Miller: \$50.00; Takaki Hashimoto: \$5.00; Lawrence Dietrich: \$3.00.

SCHULZE FUND: George Partlow: \$60.00; Antonio Gomez: \$50.00; Sara-Ann Estling: \$20.00; Charles Dahlke: \$10.00; Elisabeth Hicken: \$10.00; Takaki Hashimoto: \$5.00; Pamela Martin: \$5.00.

THOMPSON FUND: Maria Murphy: \$50.00; Takaki Hashimoto: \$5.00.

VIDEO FUND: Ellen Eddy: \$500.00; Doris Vallon-Wheeler: \$300.00; Robert Brown: \$100.00; Robin Corbin: \$100.00; Anna Bennett: \$50.00; Antonio Gomez: \$50.00; Sara-Ann Estling: \$20.00; Helen Hoskins: \$20.00; Charles Dahlke: \$10.00; June Fritz: \$10.00; Takaki Hashimoto: \$5.00; Maria Murphy: \$5.00.

WOLFF FUND: Robert Swenson: \$250.00; Stanley Neil Glass: \$150.00; Anna Bennett: \$50.00; Dorothy Howard: \$40.00; David Wolff: \$30.00; Toni Misty Johnstone: \$20.00; Arland Meade: \$20.00; Ronald Glossop: \$10.00; Takaki Hashimoto: \$5.00.

WOOD FUND: Takaki Hashimoto: \$5.00.

VOJAĜU ESPERANTE 2002

50a Jarkongreso de ELNA Sacramento CA, June 21-24

Jubileo de naskiĝo de ELNA

If you haven't already signed up, don't miss this opportunity!

NASKE – Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto *Plej bona en la mondo!*

(Formerly SFSU) July 8-26 – Brattleboro VT

Teachers: Dr. I. Koutny (Hungary/Poland); Dr. A. Melnikov (Russia); Dr. R. Resende (Brazil).

Anta-UK – Ekologie, Amazonie

July 27 – August 2

We have two nights in an "ecological park" in the jungle near Manaus to experience the diversity of this part of the world. Here there is opportunity for lectures, hikes through the jungle, and canoe rides for evening alligator-spotting as well as piranha fishing and visits to the special monkey "jungle." On July 29, return to Manaus for late afternoon flight to Belém – at the mouth of the Amazon, for 2 nights and fly to Fortaleza late afternoon of 2 Aug.

Universala Kongreso de Esperanto Fortaleza, Brazil, August 3-5

Temo: Diverseco – ŝanco, ne minaco


Our hotel is just across the street from one of the beautiful beaches of the city – with nice rooms, excellent breakfast, and air conditioning. Our price is only \$28 per person in a 2-person room!!

Post-UK Ekskurso

August 11-18 or 20, 2002

The Best of the Rest of Brazil

Salvador la Bahia retains its African soul, combined with a unique, vibrant culture. Blacks have preserved their culture more than anywhere else in the "new" world. They have maintained their religion and spirituality within Catholicism. Most tourists who have visited once want to go back again



if for no other reason than the special music and food of the area. 2 nights.

Visit the state of **Minas Gerais** for 4 days. Half of the mineral production of Brazil comes from there, and it produces 95% of all of Brazil's gemstones.

Ouro Preto, where we will stay 3 nights, is the "jewel" in the minero crown, and a World Cultural Heritage Site of UNESCO.

João Del Rei is the gateway to the stunningly beautiful village of **Tiradentes** where we will stay in a traditional posada for a night.

17 Aug – bus transfer to our hotel in Rio and half day tour of the city to Corcovado and an evening party with local Esperantists.

18 Aug – half day tour of city including Sugar Loaf Mountain - transfer to airport for flights home, or as an option, spend another night in Rio.

19 Aug – morning transfer to the airport for flight to **Iguaçu Falls**, with full sight-seeing of both the Brazilian and the Argentine sections of the falls.

20 Aug – afternoon transfer to the airport for connecting flights home through Sao Paulo.

Best Flights:

Air arrangements are complicated. We have some low round-trip fares to Brazil, but if you plan to fly anywhere besides Fortaleza, your flights within Brazil need to be tied to the international flights – preferably with the Brazil Airpass. This is limited in its use and needs to be purchased as soon as possible to get the best rates. Don't delay!

Esperanto-Vojaĝservo

6104 La Salle Av. Oakland CA 94611
Ph: 510-339-2001; Fx: 510-531-0152
lusiharmon@aol.com

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040